



8-6-1974

CGC N°
00406 504/1000-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73 Caixa Postal 07 – 1182
Telefone 4-8033
11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA

Telefone 42-9090
70.000 – Brasília (DF)

Nº 20

NOVEMBRO DE 1976

BOLETIM INFORMATIVO

Redação: – MARIA ALMADA

ĈU KRESKAS KAJ FORTIĜAS NIA MOVADO?

Brazila Konsilantaro de Esperanto estis fondita en la 4-a de junio, 1974.

Ĝia oficiala organo estas la dulingva "Boletim Informativo", la sidejo de BKE situas en Brazilio-FD.

La celo de BKE estas labori pace por nia idealo; kunvoki ĉiujn bonvolulojn por antaŭenpuŝi kaj fortiĝi nian Esperanto-movadon en Brazilio.

La direktoraro eklaboris kun kvar personoj: la Prezidanto (F.S. Almada), la Ĝenerala Sekretario (N.P. Souza), la vicprezidantino – (Elvira Fontes) kaj la financa kunordiganto (Carlos A. S. Cunha).

La saldo en la kaso estis nulo. Iom post iom niaj ĉiam helpemaj kaj malavaraj gesamideanoj donacis laŭvolan monsumon. Dum nia tuta ekzisto BKE ricevis ĉirkaŭ Cr\$ 10.000,00 dekmil kruzejojn. El tiu sumo ni registris la organizaĵon, presigis dufoje la statuton kaj ĉiu monate dissendas senpage nian Informan Bultenon al ĉirkaŭ 500 personoj.

Grupeto da samideanoj laboregas senlace por fortiĝi nian movadon ia ajn maniere, ĉu per kunlaborado efika, ĉu per ĉiaspeca helpo.

La vicprezidanta reto kreskas. Nun-

tempe ni jam havas pli ol 50, kiuj akurate kontaktas nin informante pri ĉio okazanta en iliaj regionoj.

BKE interŝanĝas korespondaĵon kun la Ministerio pri Edukado kaj Kulturo, kun la Universitatoj celante entuziasmigi profesorojn kaj gelernantojn al studado kaj disvastigo de la Internacia Lingvo.

Tial ni preparas la terenon por diplomigi profesorojn, necesamn al novaj kursoj kreotaj.

La vicprezidanta reto ankaŭ kunlaboras per verkoj en gazetoj de la lando diskonigante ĉion rilatan al Esperanto kaj ĝia instruado.

Nia laboro ne nur efikas en nia lando sed ankaŭ ekster ĝi.

UEA alte taksas la klopodojn de BKE kaj petis nian Bultenon por orientiĝi pri la brazila Esperanto-movado.

Nuntempe ni kunordigas adresaron kaj tuj post kiam ĝi estos preta ni ĝin publikigos.

Dank'al helpo de S-ano José Volpe, dua kasisto de Centro Esperantista de Santos, ĝis nun nia Bulteno kostis malpli ol Cr\$ 1,00 sed nun la prezoj altiĝis, kio okazigis al ni pli da elspezoj. Ni ne havas enspezojn krom la donacoj, kiuj tamen bonvenas el la amikoj de la movado. Nuntempe estus interese ricevi tiajn monhelpojn de tiuj kiuj

ankoraŭ ne memoris, ke ni ĉion faras senpage.

Dio rekompencu tiujn, kiuj malavare kaj bonkore volas helpi nian laboron.

La Redakcio.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

NI SCIIGAS ...

Volta Redonda (RJ) — Nia vicprezidanto, Inĝº D-ro Alberto Flores, informis pri la omaĝo farita al Esperanto dum la "XIII Spiritisma Semajno" okazinta en la nuna monato en Volta Redonda.

En la sidejo de la spiritisma societo "Sur la Vojo al Lumo" li faris prelegon klarigante al ĉeestantaro la valoron de Esperanto kiel ilo por disvastigi tra la tuta mondo la belajn spiritismajn mesaĝojn ricevatajn en Brazilo.

Li ankaŭ klarigis pri la kvalitoj de la Internacia Lingvo kaj pri ĝia utileco por la kultura kooperado inter la homoj, kiuj parolas malsamajn lingvojn, atentigante ĉiujn pri la valoro de la libro "Esperanto kiel Revelacio", kiu enhavas diversajn interesajn mesaĝojn de F. V. Lorenz pri la kreado de Esperanto kaj ĝia kreinto L. L. Zamenhof.

La libro enhavas en la portugala lingvo kaj en Esperanto 3 biografiojn: de Lorenz, Zamenhof kaj de la fama brazila mediumo Francisko Kandido Šavier. Tiu libro estas kun piezuro legata de spiritistoj kaj de esperantistoj.

Jen ekzemplo kiel profiti oportunecon por informi kaj klarigi la personojn pri nia kara lingvo.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

BUENOS AIRES (Argentino) — Nia samideano Adan Hryniewicz, C.C. 58, suc. 12, 1412 — B. Aires, sendis al ni cirkuleron T.G.P. 17-a de septembro lasta, havanta tre interesajn sciigojn pri la "Argentina Esperanto-Instituto", inkluzive pri la revuo "Tornistro", ĝia organo, kiu kostas Cr\$ 15,00 jare, do tre bonpreza kaj ege interesa. Laŭ la supra adreso oni povas abonĝi.

☆☆

BELO HORIZONTE (MG) — Nia vicprezidanto Inĝº Adonis M. Saliba Silva, direkto-

ro de "Instituto-Esperanto de Educação" gvidas nuntempe elementan, daŭrigan kaj superan kursojn de Esperanto, ĉu per korespondado, ĉu en la sidejo, liverante diplomojn al gelernantoj. Gratulon!

☆☆☆

BAURU (SP) — Cirkulero de la Baŭrua Esperanto-Asocio sendita de nia vicprezidanto, ĝia prezidanto, S-ano Euclides Geraldís de Carvalho, sciigas pri la grava evento okazinta en tiu bela urbo, dum la tagoj 18-a ĝis 23/X/76, nome ke la universitataj gelernantoj de ĉiuj fakultatoj de Baŭru en la ejo de FAFI (Fakultato pri Filozofio, Scienco kaj Beletro de la Sanktega Koro de Jesuo, decidis organizi Foiron de Universitataj Laboroj.

Ĉeestis tiun organizaĵon Lia Ekselenca Moŝto la Ministro por Edukado kaj Kulturo, D-ro Ney Braga, nia vicprezidanto Wilson Ferreira Martins, el Marilja (SP), kiu prelegis pri la temo "Lingvo Neŭtrala Internacioj Esperanto.

Ni esperas ke ĉio okazis kontentige laŭplanite kaj ke fruktodona laboro ebligis la kreon de oficiala kurso de Esperanto en iu la fakultatoj de la urbo.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

Atentu!

Absolute neŭtrala la BKE kunlaboras kun ĉiuj, akceptas la bonulojn kaj gratulas tiujn, kiujn, kiuj kapablas kompreni tion!

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

PORTO ALEGRE (RS) — De nosso vice-presidente, Dr. M. Belmonte de Abreu, recebemos xerox de seu excelente artigo publicado no "Correio do Povo", de Pôrto Alegre, de 10 do corrente, sob o título "Reforma Lingüística", no qual aborda com grande clareza o tema, em virtude de manifestação do Prof. Francisco Dequi sobre a reforma ortográfica ora necessária, a fim de se dar aos brasileiros uma grafia exata para a escrita de inúmeros vocábulos ora apresentando dificuldades a todos que se utilizam da linguagem escrita.

No seu trabalho, visa "tornar nosso idioma mais acessível — nacional e internacionalmente pela firmeza gráfica e fonética das palavras, tornando a redação do português mais simples e clara para os estudantes", diz ele.

Propõe o retorno da letra "k" ao alfabeto, a qual poderia substituir o "c" com o seu valor. Cita o Esperanto como modelo para tal modificação, indicando o livro do Prof. Dr. Walter Francini, vice-presidente do Conselho Brasileiro de Esperanto, "Esperanto sem Preconceitos" que diseca com grande propriedade as oposições ao sistema simplista gráfico-fonético".

Parabéns, caro colaborador! Ótimo trabalho.

●●●

INDAIATUBA (SP) — De nosso vice-presidente e colaborador Wanderley Peres, recebemos o "Indaiá", jornal de Indaiatuba, onde aparece expressiva colaboração sua, reproduzindo informes que o "Heroldo de Esperanto" publica. Aliás, as publicações de Heroldo, como órgão do movimento esperantista mundial, são muito úteis ao dar conhecimento de tudo que se refere à Língua internacional, ocorrendo no mundo.

●●●

SALVADOR (BA) — Nosso vice-presidente José Saraiva Matos, igualmente incansável colaborador, envia-nos um exemplar de "Gazeta da Bahia" — Turismo, com detalhadas informações a respeito do turismo naquele estado. Gratos.

Temos recebido com assiduidade a revista Viver-Bahia, igualmente tratando de turismo. Excelente informativo para os que querem visitar a Bahia.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

BRAZILIO-FD— "FREL— Frente de Renascimento Espiritual".

Nia vicprezidanto Euripedes do Nascimento, komandanto de FREL en nia ĉefurbo nacia, klopodas disvastigi la Internacian Lingvon grandskale. La de li prizorgitaj infanoj estas bone edukitaj, afablaj kaj helpe-

maj. Lia tuta familio parolas Esperanton. Dank'al S—ano do Nascimento realiĝis Seminario de Esperanto en Brazilio ĉijare. Li estis la loka kunordiganto kaj bone kunhelpis la direktadon de la evento, kiu brile sukcesis.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

NE FORGESU!

La XII Seminario de Esperanto okazos en mondfama haveno: — Santos (SP)!

D—ro Braz Cosenza, indega prezidanto de la kultura kooperativo de Esperantistoj kune kun Centro Esperantista de Santos organizos la eventon de la 14-a ĝis la 18-a de julio 1977, kies patrono estos nia samideano D-ro Antonio Manoel de Carvalho, nia karega urbestro.

Ni kore invitas ĉiujn niajn gesamideanojn partopreni la okazaĵon.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

RIO GRANDE (RS) — Nia vicprezidanto kolonelo Dirceu Porciuncula informas, ke la Esperantista Societo de Rio Grande starigis kurson de Esperanto en la "Riograndina Biblioteko", kaj ke enskribiĝis 40 gelernantoj pro la efika propagando farita de S-ro José de Almeida, de la radio "Minuano".

Ni kore gratulas al ĉiuj, kiuj tiel bone agadas.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

62-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Ĝi okazos en la preskaŭ nekonata insulo Islando dum la jaro 1977-a fine de julio. Jen oportuneco al tiuj, kiuj deziras vidi la nokto-mezan sunsubiron! Aliĝu al la 62-a!

Ĝis septembro jam aliĝis 340 personoj el 38 landoj.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

MARILJA (SP) — Nia vicprezidanto Wilson Ferreira Martins vizitis Santos. Li festparoladis ĉe la 24-a Spiritista Semajno, kiu realiĝis en Santos. Lia altnivela partopreno en tiu evento estis varme aplaŭdita flanke de la ĉeestantaro. S-ano Wilson vizitis la prezid-

danton de BKE, sciiginte lin pri sia aktiva laboro en Marilja.

Bauru, Assis kaj Marilja, tri progrese-maj kulturcentroj estas la celo de nia vic-prezidanto por enkonduki Esperanton en tieajn Fakultatojn, La cirkonstancoj estas favoraj al nia afero kaj ni gratulas nian sen-lacan kunlaboranton Martins, kiu senĉese batalas por la movado esperanta.

Kiuj pluraj urboj havas gesamideanojn batalantajn samcele? Kiu scias pri ili bonvolu informi la redakcion de nia Bulteno en Santos. Koran dankon!

ALVOKO

Kiu konas en siaj urboj esperantistojn laborantajn en poŝtoŝicejoj, volu informi nin. Antaŭdankon!

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

PRECE HINDU

Thereza Falcão

É maravilhoso, Senhor:

Meus braços perfeitos,

Quando há tantos mutilados;

Meus olhos perfeitos,

Quando tantos não têm luz;

Minha voz canta,

Quando outras emudecem.

Minhas mãos trabalham,

Quando tantas mendigam.

É maravilhoso, Senhor:

Voltar para casa,

Quando tantos não têm para onde voltar,

É bom sorrir: amar, sonhar, viver,

Quando tantos choram, odeiam e revoltam

Pesadelos e morrem sem viver.

É maravilhoso, Senhor:

Ter um Deus para crer,

Quando tantos não possuem o lenitivo de uma crença

É maravilhoso, Senhor:

Ter pouco a pedir

E tanto para agradecer.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

MONO RICEVITA

Ni ricevis kaj tutkore dankas la jenajn

donacojn : Nelson Silveira

200,00

Maria Almada 200,00

Sumo 400,00

SANTOS (SP) — O sr. José Gonçalves, vereador à Câmara Municipal desta cidade, que colaborou com grande interesse para conseguirmos a aprovação do projeto que criou a "Praça Esperanto", ora transformado em Lei sendo candidato a reeleição deverá ser o nosso preferido, por isso esperantistas apoiemos o nosso colaborador a 15 de novembro.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

FRATERNIDADE BRANCA — Esta organização eficientemente trabalha em Santos.

No quadro de suas atividades figura um curso de Esperanto por alunas do presidente de nosso BKE, entre as quais estão leda Maria Costa Porto e Marília Machado Rainho. O curso progride com cerca de 20 alunos.

☆☆☆

SANTOS (SP) — Akurate nia prezidanto verkas artikolojn por la grava gazeto "A TRIBUNA", diskonigante ĉion rilatan al nia movado tra la mondo sub la rubriko "ESPERANTO NO MUNDO".

☆☆☆

ILHEUS (BA) — O "Diário de Itabuna", importante jornal da região, publica em sua edição de 07-X-76 notícia alusiva à eleição da nova diretoria do Grupo Esperantista de Ilhéus, que ficou assim constituída:

Presidente: Eleus Leonardo de Sá, que é também nosso vice-presidente para a especialidade — Instrução e Divulgação do Esperanto; Vice-presidente: Antonio Leonardo Sobrinho; 1-a Secretária: Regina Célia Matias dos Santos; 2-a Secretária: Maria Madalena Ferreira Costa; Tesoureiro: Nelson da Silva; Bibliotecaria: Maria José Santos Souza; Diretor de Propaganda e Revista: Gerônimo Dantas do Rosário.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

SAN-PAULO (SP) — Dum la monato oktobro kunveniĝis la junularo de San-Paŭlo. La prezidanto de BEJO Ciro Freitas partoprenis. Oni kunvokis ankaŭ la plenkreskulojn. Estis pritraktita la futuro de la organizo kun

peto pri helpo de niaj gesamideanoj. La renkontiĝon partoprenis la prezidanto de BKE kaj la redaktorino de ĉi tiu Bulteno.

Dezirante kunlabori, nia vicprezidanto Bartholomeu ankaŭ ĉeestis la renkontiĝon.

La konata kaj simpatia F—ino Eliana malfermis la kunsidon kaj invitis la prezidanton de BEJO por klarigi la nuntempajn malfacilaĵojn de la organizo.

Eluzante la oportunecon, li apelaciis al gesamideanoj por ke oni helpu ia ajn maniere la organizon, ĉu per mono, ĉu per alia laboro por ke la junularo vigligu kaj fortiĝu tra la tuta lando la movadon.

Estos nepre necese reorganizi BEJO'n.

Ĝia malfortiĝo estos grava malhelpo al esperanta movado.

Tiu, kiu havos ideon rilatan al maniero helpi la junularon, volu sendi al nia redakcio en Santos.

Nia BKE deziras kunlabori efike al progreso de la junulara organizaĵo. Bonvolu kontakti nin.

Antaŭdankon al ĉiuj!

La Redakcio.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

CURSO DE ESPERANTO

Continuemos com exercícios, analisando alguns casos para elucidação:

Exercício II

Comumente a maioria dos indivíduos usa o verbo TER em lugar de HAVER, com o sentido de **existir**. Dizem, por exemplo: "Na rua TEM um menino brincando" quando deveria dizer: "Na rua HÁ um menino brincando".

E assim muitas frases há que são ditas daquela forma, erradamente.

Em Esperanto não podemos fazer a tradução daquelas formas utilizando-nos do verbo HAVI. Nunca, pois seria incidir em erro crasso.

Neste caso o verbo é ESTI e a frase deve ser traduzida: "Sur la strato **ESTAS** infano ludanta".

"Sur la tablo estas multaj libroj" — "Na mesa **HÁ** muitos livros" e não TEM.

como erradamente dizem.

Aqui há duas lições: uma de português, aplicável a muita gente e a de Esperanto que deve ser conservada com atenção.

Continuemos o exercício:

Traduzir:

Suponhamos que eu tome o café matinal às 8 horas:

Tempos compostos de verbos:

Ĉiutage

Je la 7-a horo mi **estas** trinkonta la kafon

Je la 8-a mi **estas** trinkanta la kafon

Je la 9-a mi **estas** trinkinta la kafon

Hieraŭ

Je la 7-a horo mi **estis** trinkonta la kafon

Je la 8-a mi **estis** trinkanta la kafon

Je la 9-a mi **estis** trinkinta la kafon

Morgaŭ

Je la 7-a horo mi **estos** trinkonta la kafon

Je la 8-a mi **estos** trinkanta la kafon

Je la 9-a mi **estos** trinkinta la kafon

Prestar atenção ao verbo auxiliar, ora no presente, ora no passado e finalmente no futuro, enquanto que o verbo conjugado aparece no futuro (ONTA), no presente (ANTA) e no passado (INTA).

Traduziremos:

1º Estou para beber

Estou bebendo

Tenho bebido (!)

2º Estava para beber

Estava bebendo

Tinha bebido

3º Estarei, para beber

Estarei bebendo

Terei bebido.

☆☆☆

Notamos que nos tempos compostos precisamos observar os tempos também dos participípios que podem tratar do futuro, do presente ou do passado com o verbo auxiliar igualmente no futuro, no presente ou no passado, formas de que no português temos vestígios por ser nossa língua derivada do latim. Para usar o verbo auxiliar nos tempos referidos, servimo-nos dos advérbios de tempo: "Ĉiutage" — diariamente; "Hieraŭ" — ontem e "Morgaŭ" — amanhã em lugar de dizermos presente, passado e futuro.

CAÇAPAVA (SP) — Nia senlaca kunlaboranto kaj vicprezidanto de BKE Majoro Gilberto A. Silva Velho, informis nin pri sia grava laboro tra la tuta lando kaj eĉ eksterlande. Lia korespondanto en Portugalujo, Lisbono sendis al li la belegan sonenton, kiun ni kun granda plezuro publikigas:

SALUTON BRAZILON!

Rava Lando de l' mondo okcidenta,
Paradizo de Paco kaj konforto;
Granda, laŭ ĉiuj sencoj de la vorto:
Vasta, riĉa, belega, diligenta.

Bela hejmo de gento memkontenta;
Gaja mondo, sekura de la sorto;
Brazilo estas, ja plena de forto
Kaj Brazilano, homo tre kunsenta.

Iam ni estis nur unu patri'
Kiam vekiĝis hela la aŭroro
Kaj mond' iĝis ja konant' de vi.

Ni povas jesi, ĉiuj ni, en horo:
Se vi situas fore de ĉe ni,
Vi ĉeestas, kun ni, en nia koro!

D-ro Eduardo M. Alves de Moura.

BIOGRAFIO — D-ro Alberto Flores — — Volta Redonda.

S-ano Alberto Flores, filo de la grava brazila ŝtato Rio Grande do Sul, inĝeniero pri siderurgio ĉe Uzino Volta Redonda, estas profesoro pri inĝenierarto kaj pri Esperanto. Li estas unu el la plej aktivaj vicprezidantoj de BKE, kiu klopodas enkonduki Esperanton en la fakultato de Volta Redonda. D-ro Flores estas memlernanto pri Esperanto, kio tamen valorigas la laboron de nia eminentulo, kiu senlace agadas sur diversaj kampoj por disvastigi la Internacian Lingvon.

Li partoprenis la U.K'on en Mainz, F.R. Germanujo en la jaro 1958-a kune kun sia ĉarma edzino, s-ino Glecya Zamora Flores, filino de nia estimata samideano Ary Zamora, el Pôrto Alegre.

Dum tiu internacia Kongreso S-ano Flores kontaktis plurajn famkonatajn esperantistojn kiel Edmond Privat, Ivo Lapenna, Gaston Waringhien kaj aliajn.

En Volta Redonda li estas pioniro pri Esperanto-movado.

En tiu grava industria urbo li fondis grupon, instruas la lingvon, ofte prelegas ĉe "Radio Siderúrgica" pri kulturo, ktp.

Dum la Spiritisma Semajno li estas konstante invitata paroli pri la internacia kunligilo Esperanto.

Plurfoje li havis okazon en sia ofico utiligi Esperanton. Japanoj kaj aŭstralianoj, parolante la anglan lingvon ne sukcesis bone interkompreniĝi, sed nia vicprezidanto eltrovinte ke ili scipovas Esperanton tuj provis interparoladi uzante la Lingvon Internacian, kaj ĉio fariĝis glata, agrabla kaj tre kontentiga.

Ĉijare S-ano Flores faris oficialan prelegon pri siderurgio en San-Paŭlo, en la San-Paŭlo Esperanto Asocio, utiligante Esperanton, plenumante taskon oficiale komisiitan al li.

Ĉeestis amaso da geesperantistoj speciale invitataj.

Nuntempe li klopodas enkonduki Esperanton en Fakultaton Volta Redonda.

La Esperanto-movado en Brazilo fortiĝas ĉar ĝi posedas kunlaborantojn kiel inĝeniero Alberto Flores.

LETERO DE LA PREZIDANTO DE UEA

D-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de la Societo Zamenhof, skribis al prezidanto de BKE sendante la kongreslibron pri la UK de Ateno, espriminte la deziron lin renkonti en Islando okaze de la venonta UK.

Li alvokas la brazilajn gesamideanojn partopreni la Societon Zamenhof amase.

Same estas invitataj ĉiuj gesamideanoj al UK de la jaro 1977-a, okazonta en Islando.

Ĉar la brazila movado nuntempe fortiĝas, future ĝi ludos gravan rolon en la mondo esperantista.

Kotizo por la Societo Zamenhof, kiu rajtigas esti ano ankaŭ de UEA: — Guldenoj 300.